

esperanto aktuala

Revuo de la Esperantista Brusela Grupo

Numero 2 / 2015






La babilemaj spagetoj

**babilos en Esperanto kaj manĝos kun samideanaj amikoj, la 9an de Marto ekde la 19a horo en la restoracio «Garden City»
Place de la Liberté, 6, Vrijheidsplaats
1000 Bruselo**

Tramoj 92,93. Busoj 29, 61, 63, 65. Metrostacio Madou



Venu, manĝu, ĝuu kaj... babilu !

Pli da informoi ĉe www.mlaitat.be

 **ESKAPADOJ** 



K O L O F O N O

40a ELDONJARO. **Redaktoroj** : Laurent kaj Samy Loisse : aktuala@esperantobruselo.org ;
 Fondita en 1976, de Léo De Bruyne, informilo kaj oficiala organo de Esperantista Brusela Grupo, societo centjara neprofitcela fondita je la 10a de Februaro 1907, registrita en la belga ŝtata oficiala ĵurnalo «Belgisch Staatsblad, Moniteur Belge» kun la n° 0419498274, honorigita kiel reĝa societo ek de la 29a de Majo 1957. **Aktuala estas libere elŝutebla tie** : <https://sites.google.com/site/ebgaktuala/>
Prezidanto : JM Nicolas de BUYL : prezidanto@esperantobruselo.org ; **Kasisto** : Jan Amadori jan.amadori@gmail.com
Sekretario : Laurent Loisse sekretario@esperantobruselo.org , **Informoj / kursoj** : Françoise Pellegrin fransuaz@esperantobruselo.org
Eventoj : JM Nicolas de Buyl nikolao@esperantobruselo.org **Retejo de EBG** : www.esperantobruselo.org
Abona membriĝo : 12 aŭ 18 eŭroj jare, konto : **IBAN** : BE87 5230 8055 0794, **BIC** : TRIOBEBB de la Esperantista Brusela Grupo
Kunvenejo : rue Van Maerlant 2, 1000 Bruselo Metroo Maelbeek ĉiumerkrede 18h30-20h00 - Tie nek poŝtkesto, nek telefono .
 Vidpunktoj de artikoloj en Aktuala ne nepre spegulas opiniojn de la ĉefa redaktoro aŭ de EBG - Esperantista Brusela Grupo



A G E N D O

Bonvolu kontroli la ĝisdatigojn sur nia nova retejo : www.esperantobruselo.org

Kursoj kaj kunveno okazas ĉiumerkrede en nia kunvenejo en la konstruaĵo de la Eŭropa Komisiono,
 Rue Van Maerlantstraat 2, 1000 Bruselo.

Novuloj, bonvolu sin anonci al fransuaz@esperantobruselo.org aŭ telefone +32 2 358 27 28

EBG faras alvokon al prelegontoj por plenigi sian kalendaron,
 bonvolu kontakti nikolao@esperantobruselo.org aŭ vespere 0478 382 981

MARTO

Merkredo la 4a	18:30 - 20:00 Ludovespero organizita de Bernard-Reĝis
Sabato la 7a	14:00 - 16:00 Konversacia rondo en Dilbeek Lydia Buyst : 054 33 01 51 http://www.esperanto.be/lokgrup.php#Dilbeek
Lundo la 9a	19:00 - 21:00 Babilemaj Spagetoj (paĝo 2)
Merkredo la 18a	18:30 - 20:00 Prelego : Yannick Vercammen «Daŭripovaj transportmanieroj: kiel verdaj»
Sabato la 28a	13:00 - 22:00 Serĉpromenado en Ukklo : Dieweg, 95 1180 Bruselo www.mlaitat.be/eskapadoj

APRILLO

Merkredo la 1a	18:30 - 20:00 Prelego de Neven Kovačić pri la misteroj de la Atlantido
Merkredo la 4a	14:00 - 16:00 Konversacia rondo en Dilbeek Lydia Buyst : 054 33 01 51 http://www.esperanto.be/lokgrup.php#Dilbeek
Merkredo la 15a	18:30 - 20:00 Prelego : Nicky Janssen «Kiel interesege rakonti historiojn»
Merkredo la 22a	18:30 - 20:00 Prelego : Aleksandro Melnikov el Rusio Eĉ esperantistoj kapablas ŝerci !
Sabato la 25a	Malferma Tago de la CO de UEA en Rotterdamo

MAJO

De Vendredo la 8a ĝis Dimanĉo la 10a	Semajnfina renkontiĝo PEKO por ĉiuj Domaine de Mozet, rue du Tronquoy 2, 5340 Mozet https://verdajskoltoj.wordpress.com/peko-eo/
---	--

Saluton Kara Legantaro !

Dank' al kreantoj kaj konsumantoj (spektantoj, legantoj, ...), nia plejŝatata lingvo brilas diversmaniere per sia kulturo, vojkruĉiĝo de kulturaj renkontiĝoj. Skribaĵoj, muzikoj, ktp... vibras ĉie tra la mondo.

Antaŭ nelonge, oni bedaŭris ke estis tro malmulte da filmoj (pro monrimedoj, organizo, ktp...). Veras ankoraŭ nuntempe, kvankam oni vidas pli kaj pli da mallongaj filmoj surrete : Jen eble tutnova starto !

Tamen, aŭ ĉe via preferata libroservo, aŭ surrete, vi verŝajne trovos ĝustmezuran ŝuon !

En tiu ĉi Aktuala, ni proponas al vi sekvi novan aventuron... teatre (paĝo 5). Estas nur 4 partoj, sed frandaj !

Aliafere, vi certe eksciis lastatempe pri naskiĝo de la asocio «Verdaj Skoltoj». Ne hezitu viziti la tt-ejon ĉe <https://verdajskoltoj.wordpress.com/> , kaj ankaŭ



monsubteni ilin (paĝo 20). La Verdaj Skoltoj pleje valoras ĉar tio estas fenomenaj, disflorigaj kaj mirindaj ne nur por la Esperanto-junuloj sed ĉefe por la Esperanto-movado ! 😊

Ni antaŭdankas vin.

Viaj redaktoroj

aktuala@esperantobruselo.org



Enhavo

- Paĝo 2 : La Babilemaj Spagetoj
- Paĝo 3 : Kolofono kaj Agendo
- Paĝo 4 : Edito kaj Enhavo
- Paĝo 5 - 7 : La Oka Pordo
- Paĝo 8 : La «Diplo»
- Paĝo 9 - 11 : Vojaĝo per bicliko tra la mondo
- Paĝo 12 - 13 : Ju pli belsone, des pli bone
- Paĝo 14 - 16 : La lasta IF
- Paĝo 17 - 18 : Fremdlingvo en bazlernejo
- Paĝo 19 : Gaetano koncertos dum UK 2015
- Paĝo 20 : Subtenu la Verdajn Skoltojn !



La oka pordo 1/4

UNUA SCENO: «**EN SUBGRUNDO**»

RADAMES: Aida! Mia kara princino! Kial vi sekvis min en tiun ĉi teruran malluman subgrundan lokon, karulino? Ho, kian katastrofon nia amo portis al ni ambaŭ! Kial vi ne fuĝis, kial vi...

AIDA: Radames! Fidu min! Ek! Ni alvoku la gnomon Bes, la dion de ĉiuj infanoj!


RADAMES: Bes?! Mi ofte alvokis lin en mia infanaĝo... Li instruis min ludi, ŝerci, danci...

AIDA: Kiam mi estis knabino, Bes venadis ĉe mi por vivigi miajn pupojn, instrui min danci, ludi liron... Ni fidu lin, Radames! Jen, mi alportis al li pupojn, florojn, kukojn, ludilojn, lanternojn... samkiel mi faris en mia infanaĝo. Mi esperas, ke li denove vivigos miajn pupojn, kaj tiuj helpos nin eliri el tiu ĉi prizono...

RADAMES: Aida, Aida... Ni ne plu estas infanoj, karulino! Ĉu Bes respondos nian alvokon nun?

AIDA: Jes ja, ĉar li rekonos niajn korojn. Jen, mia patro donis al mi amuleton, por kontakti la etan Bes.

RADAMES: Hmm... Provu, se vi volas. Ĉiukaze, mi ne havas alian ideon por eliri, do... provu!



AIDA: Bone. (sono: butonoj de komputono) Bes! Kara Bes! Respondu! Mi estas la princino Aida, filino de Amonarso, reĝo de Etiopio! Bes! Dio de mia infanaĝo! Mi kredas je vi! Mi bezonas vin, Bes! Bes!

BES: Saluton princino Aida, filino de la saĝa Amonarso, reĝo de Etiopio!

AIDA: Ho! Kiom da subita lumo! Dankon pro respondi mian alvokon, Bes.



BES: Mi ĉiam respondas al tiuj, kiuj rememoras min. Atendu momenton, por ke mi refreŝigu mian memoron... (sono: butonoj de komputilo) En via infanaĝo vi revis havi multajn infanojn kaj kundividi kun tiuj la ĝojojn de ludado, dancado, kantado, fabelrakontado... Ĉu vi vere havas multajn infanojn nun?

AIDA: Ankoraŭ ne. Mi ne plu estas la princino, kiun vi konis... Intertempe oni sklavigis min en Egiptio...

BES: Ho, kiel malbona novaĵo...

AIDA: Mia vivo iris laŭ malfeliĉa vojo, Bes... Sed la tempon kiun vi kaj mi pasigis kune mi neniam forgesis... Jen, mi alportis al vi la pupojn, kiujn vi ŝatas... Mi alportis la fruktojn, kukojn kaj florojn, kiujn vi ŝatas... ankaŭ etajn ludilojn kaj lanternetojn...

BES: Jes, mi rimarkas... Dankon pro ne forgesi min, Aida. Kaj vi, sinjoro? Kiu vi estas?

RADAMES: Mi estas Radames, eksa generalo de la Egipta armeo. Ankaŭ min vi ĝojigis kiam mi estis infano, kara Bes.

BES: (sono: butonoj de komputilo) Radames... Radames... Ho jes... jes ja... Por vi mi sorĉadis kanbastonojn kaj aliformis ilin en ĉevaletojn... jes... ha ha... jes... Viaj plej karaj revoj estis: defendi vian patrujon, fariĝi fama egipta heroo, akiri la favorojn de la Faraono kaj poste uzi vian potencon por ĉesigi la longajn militojn inter Egiptio kaj Etiopio. Hmm... ambiciaj revoj! Ĉu vi plenumis ilin almenaŭ etparte?


RADAMES: Mi plenumis preskaŭ ĉion, Bes. Sed ĝuste kiam mi sentis min plej proksima de la pinto de miaj revoj...

BES: Nu? Kio okazis?

RADAMES: La Faraono kaj la Granda Pastro kondamnis min al morto...

BES: Kio?! Terure! Kial? Pro kiu kulpo?

RADAMES: Oni kulpigis min pro plej grava





perfido de patrujo. Mi ja venkis la etiopan armeon, sed poste mi volis liberigi ĉiujn militkaptitojn kaj ĉiujn sklavojn, edziĝi kun la etiopa princino Aida kaj tiele unuigi niajn karajn landojn... Oni kaptis min ĝuste kiam mi planis...

BES: Sufiĉe! Mi komprenas... Vi ne perfidis la belajn revojn de via infanaĝo... Bravulo vi estas, Radames! Gratulon! Sed kio estas tiu ĉi malluma, malvarma loko?

AIDA: Ni estas ene de egipta tombo, Bes. Oni ĵus enprizonigis nin ĉi tie... La bravan Radames oni punis tiamaniere pro lia tielnomata "perfido de patrujo".... kaj mi sekvis lin ĉi tien propravole.

Mi amas lin kaj volas kundividi lian sorton kiel ajn. Bonvolu helpi nin, Bes!


Bonvolu helpi nin, kara dio de niaj infanaĝaj revoj!

BES: Jes... Mi tutkore helpos vin akiri vian liberecon. Fidu min.

AIDA kaj RADAMES: Dankon, Bes.

Tiun ĉi radiodramon verkis kaj produktis Luiza Carol el Israelo
<http://members.aon.at/aldone/retradio/>

<http://www.luch.co.il/luiza/>



Daŭrigota



Ĉu la greka maldekstro povas ŝanĝi Eŭropon ?

De Parizo ĝis Ateno, elekti siajn batalojn

En Grekujo kaj en Hispanujo, la progreso de maldekstro kontraŭstaranta la malabundo-politikojn kuraĝigas la subtenantojn de direktoŝanĝo en la Eŭropa Unio. Pli kaj pli formala, la demokratia debato multon gajnus el tio. La kultura kaj religia alfrontiĝo, la « kolizio de kulturoj », kiun la aŭtoroj de la parizaj atencoj celis ekestigi, tiom multe retroirus.



de
Serge
HALIMI

Aŭgusto 1914 : la sankta unio. En Francujo same kiel en Germanujo la laborista movado ŝanceliĝas ; la gvidantoj de la politika kaj sindikata maldekstro aliĝas al la « nacia defendo » ; la progresemaj bataloj estas metitaj en la duan vicon. Malfacilas fari alie, dum ekde la unuaj tagoj de la sangaj bataloj la mortintoj nombriĝas dekmilope. Kiu aŭskultintus paroladon pri paco en la bruo de armiloj kaj de naciismaj ekzaltoj ? En junio, en julio, eble ankoraŭ eblis efike kontraŭagi.

Jarcenton poste, la « kolizio de la kulturoj » estas ankoraŭ nur unu hipotezo inter aliaj. La batalo, kiu povus okazi en Eŭropo, en Grekujo kaj poste en Hispanujo, eble povos malebligi ĝin. Sed la atencoj de ĝihadistoj favoras la scenaron de

katastrofo ; strategio de « milito kontraŭ la terorismo » kaj de limigo de la publikaj liberecoj, ankaŭ. Ili povas nenigi ĉiujn batalojn farendajn kaj akriĝi ĉiujn krizojn, kiujn oni devas solvi. Jen la minaco. Respondi al ĝi estas la defio de la venontaj monatoj.

Ĉu desegnisto rajtas karikaturi Mahometon ? Ĉu islamano rajtas porti la burkon [1] ? Kaj ĉu la francaj judoj pli multnombre elmigros al Israelo ? Bonvenon en 2015 ... Francujo baraktas en socia kaj ekonomia krizo, kiun la ekonomiaj decidoj de ĝiaj registaroj kaj de la Eŭropa Unio pligravigis. Tamen, la religiaj temoj reaperas regule. De pli ol dudek jaroj, la temoj de « islamo de la antaŭurboj », de « kulturaj malsekurecoj », de « komunumismo » okupas la komunikilojn kiel parton de la publika opinio. Demagogoj nutras sin per ili kaj atendas ĉian okazon por grati la vundojn, kio ebligas al ili regi la scenejon. Tiom longe, kiom ili sukcesas tion, nenia baza problemo estos serioze diskutata, kvankam preskaŭ ĉio alia dependas de ĝia solvado. [2]

[1] Burko estas virina mantelo, kiu kovras la tutan korpon, do ankaŭ la kapon, kaj kiu havas antaŭ la okuloj rektangulan duone travideblan vualon, fiksitan supre kaj leveblan, se la portanto deziras malkovri parton de sia vizaĝo. Ĝi estas portata en certaj islamaj landoj, kaj en kelkaj severe preskribata por virinoj en publiko. En Ĉinujo la urbeŝtaro de Urumĉi, la plej granda islama ĉina urbo, ĵus – en januaro 2015 – decidis malpermeson de tiu vestaĵo en publiko.-vl

[2] Vd « *Burqa-bla-bla* », *Le Monde diplomatique*, aprilo 2010.

Vi trovos legindan ceteron surrete:
<http://eo.monedediplo.com/article2182.html>

Vojaĝo per bicliklo tra la mondo de Cirilo kaj Roz'




Barato

28/8 -> 2/10/2009 - 1232 km (10074 km)

▷ Niaj vestoj estas malsekegaj. En Irano ne falis eĉ guteto dum du monatoj, sed ĉi tie estas la musona periodo (junio-septembro). Tamen ne tiom pluvas, ja la humida varmeco igas nin ŝviti ĝis malsekigi niajn korpon kaj vestojn. Kvankam ĉi-jare pluvis 27 % malpli ol kutime, ni trafas kelkajn pluvegojn. Ili daŭras unu aŭ du horojn kaj inundas la stratojn. Tiam necesas eviti la ŝtopilojn de kloakaj truoj, kiujn oni malfermas por pli rapide forigi la akvon kvankam tio ĉiujare estas kaŭzo de dronoj.

En Nov-Delhio, same kiel en la tuta lando, plej rimarkeblas la impresa kvanto da biciklantoj. Sed ili tute ne sportumas nek promenas. Tie, velocipedoj antaŭ ĉio est utiligaj, temas pri laboriloj. Kaj ili utilas por transporti ion ajn, ja ion ajn. Antaŭ ol ni venis al Barato, ni ne sciis, ke eblas transporti tiom multe da aĵoj sur biciklo. Povas esti frukoj kaj legomoj, mebloj, glacikuboj, dikaj kartonoj plenaj je varoj por liveri, kamionaj pneŭoj et, precipe, gasujojn. Jes ja, je pluralo, ĉar ili estas pluraj, ĝis ses, kaj ne etaj por tendumado sed ja dikegoj por hejmoj. Ni subite sentas kvazaŭ ni vojaĝas senpeze.

Dum la tempo de nia restado en Nov-Delhio ni moviĝas per motoraj rikiŝoj, komune nomataj tuk-tuk. Temas pri etaj du-pasaĝeraj taksioj sed ili foje transportas pli ol dek homojn (du ambaŭflanke de la ŝoforo, ses malantaŭe, plus du aŭ tri alkroĉigitaj ekstere, foje eĉ sur la tegmento). Estas miksaĵo inter mopedo kaj trirada aŭto kaj ili enŝoviĝas inter aŭtoj kaj bicikloj por nur unu eŭro tra Delhio. Vespere, ni revenas al ŝika kvartalo de Nov-Delhio, kie nia gastiganto, Hector, kunordigas la agadojn de la hispana ruĝa kruco en Barato. Li helpas la lokulojn por plibonigi iliajn ĉiutagajn vivajn kaj higienajn kondiĉojn. Lia franca kunulino ĵus revenas de suda Francio kun valizoj plenaj je bongustaĵoj memorigante nian landon: kolbasegoj, fromaĝoj, vino...





Ĉe ili, la unuan fojon ni lasas niajn biciklojn por trajni al Amritsar, apud Pakistano. Nokta vojaĝo faras nin alveni frue. Ni tie vizitas la sikhan Oran Templon lokitan meze de akvo kiel lotuso kaj ene de kvadrata palaco kun kvar enirejoj por akcepti vizitantojn el ĉiuj horizontoj.

La sikhoj kontraŭas kastojn, kiuj oficiale ne plu ekzistas sed daŭre estas uzataj en la ĉiutaga vivo. Miloj da pilgrimantoj celas al la Ora Templo por preĝi. Ni surloke senpage gastas kaj estas nutrataj. Manĝaĵoj diurne kaj seninterompe estas provizataj. Oni sidiĝas unu ĉe la aliaj sur longaj tapiŝoj kaj sikhoj disdonas supon, pladon kun spicizitaj legomoj (rizo, fazeoloj, lentoj, ktp), deserton kun sukera semolo, platpanon kaj akvon.


Posttagmeze, amastaksio kondukas nin kontraŭ bagatela sumo ĝis la pakistana landlimo, kie ĉiuvespere okazas militistan ceremonion por fermi la landlimon, unu horon antaŭ la sunsubiĝo. Estas loko por paca streĉliberiĝo, oni kredus sin en piedpilka maĉo. Side sur tribunoj el betono, ĉiu kontraŭstaranto skoldas la alian nacion, instigata de vigla viro kun laŭtparolilo. La spektantoj krias "Hindustan" (Barato) je nia flanko, "Alah akbar" (Dio grandas) aliflanke.

हिन्दुस्तान

الله أكبر

Militistoj kiel marionetoj paŝas levante la gambojn tre alten kaj je dek centimetroj ambaŭflanke de la dividlinio faras ampleksajn minacgestojn sen tuŝi tiun je la alia flanko. Fine, la flagoj de ambaŭ nacioj estas samtakte malaltigataj kaj la bariloj estas fermataj kun forta klakbato. Post la ceremonio la baratanaj spektantoj rapidas al la pakistana landlima barilo, ni ne bone komprenis kial, ĉar estas nenio aparte videbla.

Ni nun direktiĝas al Agro, ĉi-foje per biciklo. Ni tie denove elektas tranoktadon en sikha templo. Estas malpli koste ol hotelo, ankaŭ pli pure kaj oni sentas sin pli sekura. Agro estas urbo de plejbono kaj plejmalbono, kie ni vizitas Taĝ-Mahalon, juvelon el marmoro en nesto de mizereco, kaj la ruĝan fuorton.



Dum ni estas piedirantaj al la urbocentro ni malkovras "publikajn necesejojn senmurajn", fakte plurajn ortangulajn truojn vojrandajn je kvardek kaj sesdek centimetroj. Viroj malaltigas sian pantalonon antaŭ ĉiesrigardo, virinoj atendas la vesperon por veni.

Ankaŭ koncerne hotelojn ne finiĝis la surprizoj! Ni ĉiutage ekserĉadas tranoktejon ekde la dek-sesa horo. Ekster grandaj urboj kvazaŭ temas pri neebila misio. Oni ĉiam direktigas nin al la sekva vilaĝo.

Ni neniam trovis hotelon antaŭ noktiĝo

dum nia tuta trabarata irado. Tamen ne estas alternativo, estas la unua lando, kie ni ja devas hotelumi, ĉar neniu akceptas nian tendon sur sia tereno kaj la troloĝantaro malebligas sovaĝan tendumadon, ĉiam estas homoj ĉie.

Plie, la higieno de iuj hoteloj foje malaltnivelas. La prezo rilatas pli kun la grandeco de la dormĉambro ol kun ĝia pureco aŭ komforto. Fakte, foje eĉ povas okazi, ke ne estas lito en la ĉambro sed nur surmuraj kroĉiloj por pendumigi sian propran hamakon. En tia kazo ni starigas nian tendon en la ĉambro, kion ni povas ankaŭ fari eĉ kiam enestas lito se ĝia pureco iom suspektindas aŭ kiam tro multajn insektojn allogas niajn kaplampojn

Ĉar la elektro estas alia problemo. Laŭ la graveco de la urboj ne plu estas elektro ekde diversaj horoj en la vespero, kio povas okazi de la 18-a ĝis la 5-a horoj en la plej aĉa kazo (noktas jam de la 18-a). La ĉefajn stratojn prilumigas la benzinaj elektrofabrikiloj de la komercistoj, kiuj ĉiuj havas unu ampolon aŭ kandelon. La aliaj stratoj mallumegas.



Post Agro, ni direktiĝas al Varanaso (Benareso). Ni biciklas en la Ganĝo-valo, la plej loĝata valo en la mondo. Ne troveblas loko en la kamparo, kie ne videblas domo, ne estas pado sen biciklanto kaj ĉiu vilaĝo distancas je nur

5 km. Ni alvenas en Benareso kiam komenciĝas tre grava religia festivalo. Oni ĉi-okaze konstruas kolorplenajn templojn per bambuoj, kun interne la multbraka diino Dugo. Ŝi estos ĵetata riveren la lastan tagon. Dum la tuta festivalo laŭtparoliloj diurne elvomas laŭtegan muzikon, kaj lumoj trembrilas ĉie tra la urboj, iomete kiel dum Kristnasko.



Ni vidas la famajn kremaciojn de homaj kadavroj, kaj la ĉiutagan vesperan ceremonion antaŭ Ganĝo, en kiu baratanoj baniĝas por puriĝi. Koncerne nin, vidinte la aspekton de la akvo, ni kontentiĝas per simpla piedmalsekiĝo.

Elde Nov-Delhio ni biciklis sur aŭtoŝoseo. La aŭtoŝoseo estas senpaga por bicikloj... kaj bovoj, kiuj frandas la herbon sur la centra dividkoridoro kaj remaĉas sur la dekstra trako (oni veturas maldekstflanke, kiel en Anglio) antaŭ ol ege malrapide transiri la ŝoseon.

Ĉe ili, la unuan fojon ni lasas niajn biciklojn por trajni al Amritsar, apud Pakistano. Nokta vojaĝo faras nin alveni frue. Ni tie vizitas la sikhan Oran Templon lokitan meze de akvo kiel lotuso kaj ene de kvadrata palaco kun kvar enirejoj por akcepti vizitantojn el ĉiuj horizontoj.



Ju pli belsone, des pli bone !

Ju pli belsone kaj nature ni parolos Esperanton, des pli nia kara lingvo plaĉos al la mondo.

Esence ĉiuj homaj lingvoj estas paroleblaj kaj parolataj.

La surpaperigitaj skribaĵoj kiujn oni vidas en libroj kaj gazetoj, estas nenio alia ol reprezentado de tio, kio estas kutime dirata kaj aŭdata de la homaj estuloj dum iliaj ĉiutagaj interparoloj.

Ĝuste en ĝia parolateco kuŝas la esenco mem de kiu ajn vivanta lingvo, kaj la vere surpriza fakto estas, ke nur kelkaj el la miloj da lingvoj nun parolataj en la mondo estas fakte skribataj kaj multegaj ankoraŭ restas nur en sia sona stadio, dum iliaj parolantoj eĉ ne suspekas ke ekzistas alfabetoj kaj skribsistemoj.



D-ro Zamenhof surpaperigis esperanton por povi laŭ la tiutempaj eblecoj, transdoni ĝin al ni kaj por ke ni niavice vivantigu ĝin, alivorte, por ke, pere de inteligenta kaj senlaca studado, ni funde ellernu ĝin kaj kun la tempo ni estu pretaj transdoni ĝin mature kaj nature al nia posteularo.

Sed, ĉu oni rajtus diri, ke oni ja scipovas lingvon funde se oni apenaŭ legas kaj skribas en ĝi, sed tre modeste kaj malflue ĝin balbutas?

Ŝajnas al ni, ke unu el la grandaj kialoj por la kutima malfacileco varbi novajn Esperantistojn estas ĝuste la evidenta manko de flueco de multaj el la jamaj uzantoj de nia kara lingvo.



Ĉu vi mem, kara leganto kaj aŭskultanto, sentus vin allogata eklerni lingvon kies propagandantoj ankoraŭ tiel malbelsone kaj sengracie ĝin elbuŝigas?

La iniciantinto de Esperanto ne nur enmanigis al ni la plej strukture perfektan lingvon en la tuta historio de la homaro, sed ankaŭ la plej belsonivan el ĉiuj, kaj sekve, estas ni, la nuntempaj Esperantistoj, kiuj ludu tiun plibelsonigantan rolon, komencante ĉe ni mem, antaŭ ol nemature ekrapidi al la stratoj serĉe de novaj adeptoj por nia afero.

Multaj el niaj samideanoj sin demandas, kial ili ordinare povas relative facile legi kaj skribi en Esperanto, sed apenaŭ kapablas ĝin balbuti modeste ĉe la plej simpla provo ion elbuŝigi en ĝi.

Al ilia ofta demando: "Kial tio okazas al mi?" ni kutime respondas per alia demando: "Ĉu vi hazarde iam vin ekzercas parolante laŭte?" Preskaŭ ĉiam la respondo estas nea kaj la pretekstoj kaj pseŭdoklarigoj multaj.

Estas fakto, ke sen ofta parola (orela, voĉkorda, lipa, langa kaj makzela) gimnastikado neniam kreigus eĉ ĉe la plej lertaj lernantoj la kutimo aŭtomate paroli. Nur observante nin mem dum ni parolas nian denaskan lingvon, ni konstatas, ke oni pensas per la cerbo sed parolas per la buŝo.

Tio, kio okazas ĉe la buŝo, (la ordigado de la vortoj, la flua artikulaciado de la sonoj, la nekonsciaj konjugado de la verboj kaj kunordigado de substantivoj kaj adjektivoj, ktp. ktp.) okazas tute aŭtomate kaj laŭŝajne senpene, rezulte de parolkutimoj kreigitaj ĉe ni iom post iom laŭlonge de niaj vivoj.

Ĉi-tio indikas al ni, ke pli ol al la cerbo, estas al la orelo, la lango, la lipoj, la gorĝo, la pulmoj kaj al ĉiuj partoj de nia parolaparato al kio oni fakte instruu la lingvon.

Se la silenta legado de romanoj direktiĝas nur al la cerbo, influante ĉefe oniajn imagivon, sentivon kaj pensivon, la lernanto certe pli kaj pli bone komprenos tion kion li legos, sed nur per tio neniel li fariĝos pli lerta kaj natura parolanto.

Temus tiaokaze nur pri analiza aŭ elkodiga, sed ne pri kutimokrea procezo, efektive kondukanta al belsone kaj senpene flua elbuŝigado de niaj frazoj.

Laŭ nia propra plurjara lingvolernada sperto, ni povas konsili al niaj legantoj kaj aŭskultantoj tri efikegajn sekretojn por fariĝi fluaj Esperanto-parolantoj:



1. Aŭdu kiel eble plej ofte bone parolatan Esperanton.
2. Parkerigu, (jes, mi ripetas, PARKERIGU) almenaŭ tri novajn frazojn ĉiumatene kaj tri aliajn ĉiuvespere.
3. Dediĉu nepre 15 minutojn ĉiutage al Esperanta laŭtlegado per via propra buŝo.

La ofta elmetado de nia orelo al ĝuste kaj bone parolata Esperanto estas nepre necesa

por disvolvi naturan parolfluecon kaj la kapablon kompreni tion, kion aliaj diras al ni parolante je normala rapido. Tion farante, ni iom post iom ricevados la necesajn aŭdimagojn sur kiuj baziĝos nia natura parolmaniero. Dank'al sia senso de aŭdado oni povas asimili la efektivajn prononcadon, ritmon, frazmelodion, kaj la diversajn intenconuancojn de la homaj parolataĵoj. La ĉiutaga parkerigado de novaj frazoj donas al la SUBKONSCIA menso la vortaron kaj strukturojn per kiuj oni povos AŬTOMATE paroli. Alvenos la momento, kiam onia propra kolekto da parkerigitaj frazoj estos tiel granda, ke la cerbo, elplukante partetojn de diversaj el ili, tute nature kaj rapide kunmetos la siajn proprajn; krome, ni neniam ĉesos insisti pri tio, ke por alkutimigi kaj plilertigi la langon kaj la orelon al la sonoj kaj dirmanieroj de Esperanto estas treege konsilinde, ke ni laŭtlegradu kaj relegadu ĉiutage, preferinde ĉiufoje je la sama horo, ĉapitrojn aŭ artikolojn perfekte kaj belstile verkitaĵojn de imitindaj aŭtoroj.

Fine, ni sincere konsilas al vi ĝisfunde enkapigi jenan aserton:

«*Se miaj lango kaj lipoj ne moviĝos, mia parolmaniero tute ne plifluiĝos.*»



Luis Jorge Santos Morales

Aŭdebla ĉi-tie:

<https://soundcloud.com/luis-jorge-santos-morales>

LA 31-a INTERNACIA FESTIVALO EN JÜLICH

27.12.2014 - 3.1.2015

Kadra temo: Novaj energioj



La ĉi-jara Internacia Festivalo estis vere la lasta. Enskribiĝis 106 personoj el 18 landoj. Tamen kelkaj ne povis ĉeesti pro diversaj kialoj. Sed aperis novuloj, kiuj bedaŭris ne malkovri la IF-on pli frue. Dum la tuta semajno regis familia etoso, en kiu ĉiuj ĝoje amuziĝis post la vespera programo en la "Knajpo".

La program-oferto, kiel ĉiam estis bunta, aperis kelkaj kromaj programeroj. Ĉiu povis elekti laŭ sia plaĉo.

Kun bedaŭro ni konstatis la forpason de Rémy Bouchet al kiu ni omaĝis per kelkaj vortoj kaj rememoroj en la Interkona vespero.

La vetero favoris nin kaj instigis al pluraj promenadoj en la urbo kaj en la apuda parko. La novkonstruita IF-ejo laŭ hoteleca stilo estas tre komforta kaj ĝi plaĉis al ĉiuj. En la manĝejo ni mem priservis nin kaj la manĝo estis bongusta.

Al la kadra temo kontribuis ĉefe Alfred Schubert per prelegoj pri "Energi-ŝanĝiĝo en Germanio" kaj "Vetveturado per elektraj aŭtomobiloj". Krom tio okazis jam la 8-an fojon IVU-prelegoj (Internacia Vintra Universitato) agnoskitaj kiel AIS sesioj. Okazis ekzamenoj kaj en la Adiaŭa vespero oni disdonis atestilojn al la sukcesintoj. Kadre de IVU Amri Wandel prelegis pri "La scienca revolucio de

Einstein - 2015 centjara jubileo de la Teorio de Relativeco" kaj pri "Vivo sur foraj planedoj - la revolucio de la spac-teleskopo Kepler". En iu sennuba vespero ni havis okazon spekti la ĉielon kaj Lunon per malgranda teleskopo kun klarigoj de Amri. Dieter Kleemann prelegis pri "Romkatolika misia agado en Japanio kaj la sekvoj por la socia strukturo kaj politiko en la lando". Mikaelo Bronŝtejn parolis pri "La monda E-literaturo: enspezo de Rusio". Krome li prelegis pri "Rusio kaj Ukrainio, la du ŝtatoj - ĉu frataj?", klarigante ĉefe la historion de Ukrainio.

Same kiel en aliaj IF-oj ni povis ekscii pri la rusa eldonejo Impeto kaj Anna Striganova rakontis pri fabelaj mondoj kaj montris siajn pupkreaĵojn. En aliaj prelegoj ni eksciis pri "Vegana vivo el propra sperto" de Klaus Friese. Harald Schicke parolis pri "Alia alirmaniero al malsanoj". Aŭtoran horon pri siaj libroj havis Nora Caragea. La profesia ĵurnalisto Alfred Schubert informis pri la funkciado de gazetara sistemo. Lia prelego titoliĝis "Efike kunlabori kun ĵurnalistoj" kaj krome li instruis nin kiel bone foti. André Weber malkovris kaj diskutis pri siaj spertoj rilataj al malgrandaj gajnoj: "Sukcesetoj per akcioj kaj fondusoj". Li ankaŭ gvidis posttagmezan ekskurseton al elfosejoj en la regiono de Hambach kaj al biogas-produktejo. Dieter Rooke animis lecionon pri didaktiko.



Pri ĝemelaj urboj interesiĝas kaj klarigojn pri ili donis Pieter Engwirda. Prelego de Ian Fantom titoliĝis: “La Kaiser, Titanic kaj la Unua Mondmilito”. Karl Breuninger parolis pri sia eksterordinara rilato kun Rusio kaj Sovetio dokumentita per multaj bildoj. Matene oni povis ekzerci “Tai-chi-chuan” kun Barbara Poterucha kaj poste malstreĉiĝi per dancgimnastiko kun Vera Vlasova.

Kelkaj partoprenantoj ankaŭ plurfoje profitis saŭnadon. Dum la kafopaŭzoj ĉiuj vigle babilis aŭ rigardis fotoalbumojn de Liba Gabalda pri ĉiuj IF-oj, kiujn ŝi kun Floreal ĉeestis. Ili ankaŭ projekciis filmon pri rememoroj el diversaj IF-oj. Entute ili partoprenis 23-foje. Tiom plaĉaj la festivaloj estis.



Ankaŭ Brian Moon prezentis lastjaran IF-on en retrospektivo. Liba organizis la dancvesperon laŭ la latinamerika muziko, ne mankis ŝiaj hejmfaritaj kuketoj. Bone funkciis la libroservo prizorgita de Paul Peeraets kaj Jean Luc Thibias.

Oni spektis kelkajn bildprezentojn pri diversaj vojaĝoj fare de niaj partoprenantoj. Barbara Muhlemann prezentis kaj parolis pri sia vojaĝo en Argentino okaze de la 99-a UK, Amri Wandel vizitis kaj rakontis pri siaj vojaĝspertoj en Hindio, Liba kaj Floreal montris filmon pri Nepalo de Roman Dobrzyński.

En marto ili partoprenis la Specialan

Renkontiĝon organizitan de nepalanoj kaj poste ili kune vizitis la orientan parton de la lando.

La ĉi-jara tuttaga ekskurso gvidis nin al Kolonjo, kie ni unue promenis en la urbo sub ĉiĉeronado de Winfried Schumacher, kiu tie loĝas. En restoracio, kie ni tagmanĝis ni renkontis Bruno-n Knapstein kun lia edzino. Li estis longjara partoprenanto kaj kunhelpanto de IF-oj. Pro sia aĝo li ne povis partopreni dum la lastaj du jaroj.

En vesperaj programeroj sonis la E-kantoj de latvaj kaj rusaj partoprenantoj, koncertis Nataŝa Bertse el Svedio.

En la Internacia vespero niaj talentuloj prezentis kantojn, dancojn, amuzajn skeĉojn, akordionan kaj gitar-ludadon. Specialan muzikon sen vera instrumento prezentis Waldemar Ebel per plasta strio inter siaj lipoj.

Silvestraj bufedo kaj balo, kiu komenciĝis per polonezo, estis plurfoje interrompita pro festado de diversaj Novjaroj. Tio ebligis multfojan tostadon, brakumadon kaj interkissadon de la ĉeestantoj.

La lasta vespero - Adiaŭa IF estis triste festena. Hans-Dieter Platz (HoDoPo), la ĉef-organizanto de la aranĝo ofertis glason da ŝaŭmvino kaj donacis al ĉiuj DVD-diskon kun fotoj de ĉiuj IF-oj. Li kore dankis al ĉiuj kunhelpantoj kaj prelegantoj.

Ankaŭ ni dankis lin pro IF-oj, kiujn li tiel bone kaj profesie organizis. Bona etoso regis ĝis malfruo en la apuda enirhalo. Tiel finiĝis la longjara internacia festivala tradicio kun nostalgio daŭrigi...

Liba Gabalda





Novaj partoprenantoj




Anna Striganova



Latva vespero



Dancvespero



Rusa vespero




Nataša Bertse



Alfred Schubert



Harald Schicke



Klaus Friese 11/2014



Amri pri Hindio



Floreal Gabalda



Barbara pri Argentino



Kolonjo



31a IF Jülich



Dieter Kleemann



Internacia vespero



Adiaŭa vespero




Gila Wandel



Fotis kaj aranĝis Liba kaj Floreal Gabalda

Fremdlingvo en bazlernejo



En lernejo la instruado de fremda lingvo ne estas fako en kiu la lernantoj unuavice akiras iun scion, sed la lernanto akiru lertecon en alia lingvo ol la lingvo en kiu la instruado ĝenerale okazas.

Mi pensas ke la lernado de fremda lingvo estas plej bone komparebla kun la lernado ludi muzikinstrumenton. Kvankam por tio ja ankaŭ necesas teoriaj scioj ekz. pri la funkciado de la instrumento, la lernado tamen konsistas ĉefe el ekzercado.

Tiu ekzercado devas okazi sufiĉe ofte kaj ĝi devas okazi longdaŭre. Kaj en muziklernejo sufiĉe baldaŭ okazas la unuaj koncertoj de la lernantoj, ili prezentas tion kion ili lernis al siaj gepatroj en komuna koncerto.

Se ili povas sukcese prezenti ion, tio instigas ilin al daŭrigado de la lernado. Kaj tio ja necesas, ĉar la lertecon ludi muzikinstrumenton sufiĉe rapide malaperas se la lernanto ne regule ekzercas.

Multaj gejunuloj pro tio ludas en junulara orkestro kaj tio estas ankaŭ tre bona por ilia socia evoluo.

Rilate al lingvolernado tio bedaŭrinde plej ofte ne okazas.

La gejunuloj lernas kaj lernas, sed ili dum longa tempo ne povas apliki tion kion ili lernis. Kaj la ekzercado apenaŭ okazas.

En la klasĉambro apenaŭ estas okazo por paroli la fremdan lingvon kaj tiel ekzerci ĝin. Kaj hejme la afero aspektas simile. Estas kompreneble diferencoj laŭ la lingva situacio.

Se la lernanto povas apliki la lingvon en la ĉiutaga vivo, ĉar estas multaj homoj en la medio kiuj parolas la fremdan lingvon, tiam la lernanto ja havas la eblecon praktiki kaj ekzerci la lingvon. Tio okazas ekzemple en landoj kun malgrandaj lingvoj.

Sed en landoj kun granda lingvo, ekz. Germanio kaj Aŭstrio, la propra lingvo estas tiel forta ke oni apenaŭ bezonas fremdan lingvon en la ĉiutago.



Sekve precipe la lernantoj en kamparaj regionoj lernas ion en lernejo kion ili ne bezonas resp. eble bezonas nur kiam ili estos plenkreskuloj.

Pro tio la komenca entuziasmo pri la lernado de nova lingvo plej ofte sufiĉe rapide lamiĝas kaj la tuta instruado apenaŭ alportas progreson.



Tial ofte post 8 jaroj de lernado de ekz. la angla lingvo en gimnazio multaj lernantoj apenaŭ scipovas paroli la lingvon.

Por plibonigi tiun situacion oni havis la ideon komenci la instruadon de la unua fremda lingvo jam en la bazlernejo, ĉar dum tiu koncerna aĝo la infanoj pli facile lernas novan lingvon.

Tio ja estas vero, sed tio nur validas se la situacio estas tia kiel mi priskribis ĝin por muzikinstrumento.

Jam antaŭ 20 jaroj oni enkondukis instruadon de la angla lingvo en la bazlernejo en Aŭstrio. Sed tio nur laŭnome estas instruado.

La afero plej ofte limiĝas al kantado de anglalingvaj kantoj.

Laŭplane la instruado okazu dum nur 1 (!) instruhoro semajne kaj eĉ tio ofte ne okazas. La instruistinoj plej ofte ne estas kapablaj instrui fremdan lingvon kaj nur malbone parolas ĝin.

Tion nun finfine oni rimarkis. Sed la ŝtataj instancoj ne scias kion fari.

Oni ne povas aŭ ne volas investi pli da mono, ĉar la kostoj ja eksplodis, se oni volus kovri la tutan landon. Tio estas situacio kiu "krias" pri Esperanto.

La propedeŭtika instruado de Esperanto en la tria kaj kvara klasoj de bazlernejo havus sencon, ĉar la infano lernas ion pri la funkciado de lingvo kaj tio povus servi kiel fundamento por la lernado de aliaj lingvoj.

La kostoj por Esperanto estus konsiderinde malpli altaj, ĉar la instruistinoj povus akiri la necesajn konojn de la lingvo dum sufiĉe mallonga tempo.

Niaj Esperanto-institutoj en la diversaj landoj nun havas bonan ŝancon por la prezentado de konceptoj pri la enkonduko de Esperanto kiel propedeŭtika fako en bazlernejoj. La tempo maturiĝis.



GETCH Gaëtano



Ĉu vi memoras FESTO-n 2013 en Amikejo ?
Gaetano furoris per sia talento kaj sindonemo.
Dum UK 2015, la 28an de Julio, vi multnombraj
spektu nian plej ŝatatan bruselanan artiston, ĉar li
kantos kelkajn kanzonojn de sia repertuaro ... sed
ĉi-foje en Esperanto !





Subtenu la verdajn skoltojn !



Nomo: Verdaj Skoltoj
IBAN BE25 9731 2584 2982
BIC ARSP BE22